WIKIPEDIA

Portugala lingvo

La **portugala lingvo** (portugale: *português*) estas lingvo latinida, nun parolata de preskaŭ 200 milionoj da homoj. Ĝi estas la sesa plej parolata mondlingvo, parolata en Eŭropo, Ameriko, Afriko, kaj Azio. Nur la mandarena, la hispana, la angla, la hindia, la bengala havas pli da parolantoj. Ĝi estas en la sama rango kiel la araba lingvo aŭ la rusa laŭ la nombro de parolantoj.

Portugala	
português (por/tu/geĵ) (por/tu/gejz)	
Parolata en	Portugalio, Brazilo, Angolo, Mozambiko k.a.
Parolantoj	202 225 450
Denaskaj parolantoj	210 milionoj
Fremdlingvo / dua lingvo por	ĉa. 20 milionoj
Skribo	latina kun kelkaj aldonoj
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Italika	
Latinida lingvaro	
Ibero-latinida lingvaro	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Portugalio, Brazilo, Angolo, Mozambiko k.a.
Reguligita de	Instituto Internacia de Lingvo Portugala, Komunumo de portugallingvaj landoj, Brazila Beletristika Akademio, Sciences Academy of Lisbon
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	pt
ISO 639-2	por
ISO 639-3	por
Glottolog	port1283
Angla nomo	Portuguese
Franca nomo	portugais
Vikipedio	

Enhavo

Origino
Strukturoj
- Diftongoj
- Forta silabo
- Morfologio
  - Artikoloj
  - Numeraloj
  - Pronomoj
  - Substantivoj kaj adjektivoj
- Sintakso

Parolantoj
Variaĵoj
Nova ortografio
Vidu ankaŭ
Referencoj
Eksteraj ligiloj
Literaturo

Origino

La lingvo estiĝis en Portugalio (en la frua 12-a jarcento), devene de la regiona vulgara latino, kiu estis parolata en Iberio de la 1-a jarcento a.K. ĝis la 9-a jarcento, kaj poste la barbara latino, ĝis la 12-a jarcento. La lingvo disvolviĝis laŭ du branĉoj : la originala branĉo norde, kiu estis parolita en la du flankoj de la rivero Minjo (Minho, portugallingve)- do ankaŭ en la teritorio kiu estas Galegio), kaj alia pli poste sude, nomita muslin-araba latinida lingvo, kun kelkaj malsamoj, ĉefe fonetikaj pro araba influo. De la interinfluo de ĉi tiu kun la unua (la galeg-portugala dialekto) elirus la portugala lingvo. La lingvo havis ĝis nun du periodojn: la **arĥaikan portugallingvon** (12-a jarcento ĝis 15-a jarcento) kaj la **modernan portugallingvon** (15-a jarcento ĝis nun).

Strukturoj

Prononco

e = **e**, sed **i** en malfortaj pozicioj
u = **u**
o = **u** kiam ĝi ne akcentas post forta silabo, regione ankaŭ antaŭ forta silabo; **o** kiam ĝi akcentas
ou = **oŭ**; **o** aŭ **oi** regione
nh ≅ **nj**
lh ≅ **lj**
s = **s** vortdebute aŭ postkonsone; **z** inter du vokaloj; **ŝ** aŭ **z**, laŭ regiono, vortfine aŭ antaŭ **c**, **f**, **p**, **t**, **q** (ekzemplo: os Portugueses (uŝ Purtugezeŝ) = la portugaloj)
j = **ĵ**
ã = franca **un**
ão = naza franca **an**, sed la o ankaŭ estas naza
x = **ŝ**, **s**, **ks** aŭ **z**. Kune kun *c* havas nenian sonon (ekzemplo: exceto (esetu) = escepte de)
z = **z** sed **ŝ** vortfine en Lisbono kaj Rio-de-Ĵanejro

Fonemiko

a [*a*], b [*be*], c [*se*], d [*de*], e [*e*], f [*ef*], g [*je*], h [*a-ga*], i [*i*], j [*ĵota*], l [*el(j)*], m [*em(j)*], n [*en(j)*], o [*o*], p [*pe*], q [*ke*], r [*erh(j)/eĥ(j)*]*, s [*es(j)*], t [*te*], u [*u*], v [*ve*], x [*ŝiŝ*]**, z [*ze*] — krom tiuj literoj ekzistas ankaŭ: k [ka aŭ kapa], w [*dablju* aŭ *duplu ve*], y [*ipsilon*, aŭ *i-gregu*).

- La /R/ estas elparolata multmaniere de portugallingvanoj. La prononco *ĥ* estas komuna nur en Rio-de-Ĵanejro kaj Lisbono, kie eblas ankaŭ prononci *h*, kiel en brazila nordo kaj nordoriento, aŭ *rr* kiel en sudo de brazilo kaj proksime al limoj de Hispanio, kaj ankaŭ retroflekse en areo de indiĝena influo.
- La litero x, male al aliaj lingvoj, estas tre grava al portugala elparolado. Ĝi havas 4 valorojn : /z/ : exército /i'zɛr-sitŭ/; /ŝ/: xeque /'ŝɛkj/; /ks/: taxi /'ta-ksj/; /s/: sintaxe /sin'ta-sj/

Specimeno
La Patro Nia
(Aŭdigu sondosieron (https://www.wikipedia.com/upload/paternoster-pt-pt.mp3))
Pai nosso que estais no céu *Santificado seja o vosso nome* *Venha a nós o vosso reino* *Seja feita a vossa vontade*

Krom la literoj, oni ankaŭ povas havi la jenajn grafiajn kombinaĵojn : á, à, â, ã, é, ê, í, ó, ô, õ, ú. Ankaŭ estas la cedilja c "ç" */s/, kaj la duliteroj* ch *(kiel esperanta* ŝ*), "lh" /ʎ/ proksime [lj] kiel la itala "gl") kaj "nh" /ɲ/ proksime al [nj] kiel la itala kaj franca "gn"). En la Portugala estas la "gu" kaj "qu" kiuj estas la dulipaj* g *kaj* k', tiu estas, la gŭ kaj kŭ kun la konsonantoj prononcaj samtempe al ŭ. Tio estas pra-hindeŭropa heredaĵo de la portugala kiu malaperis en la plejparto de modernaj lingvoj.

Assim na terra como no céu
O pão nosso de cada dia nos dai hoje
Perdoai-nos as nossas ofensas
Assim como nós perdoamos a quem nos tem ofendido
E não nos deixeis cair em tentação
Mas livrai-nos do mal

Estas fenomeno nomita "antecipo de sonoreco": la sonora fonemo malmoligas la antaŭan fonemon.

La plej grava en la portugala lingvo estas daŭro de vokaloj. En la portugala, silabo povas esti **forta**, **duonforta** aŭ **malforta**. La vokaloj de fortaj silaboj estas ĉiam longaj, la silaboj de malfortaj silaboj, se estas post la forta, estas mallongaj kaj la vokaloj de malfortaj silaboj antaŭ la forta povas esti longaj aŭ mallongaj. En Portugalio kaj Afriko, nur la duonfortaj kaj fortaj silaboj povas havi longajn vokalojn, kaj ĉiuj malfortaj silaboj havas mallongajn silabon (antecipo de silabforto). Sed en Brazilo, la tute nefortaj silaboj ankaŭ povas esti longaj aŭ mallongaj. Sekve al tiu regulo, oni ĝenerale la malfortajn finajn silabojn apenaŭ prononcas, ili estas mallongaj kaj preskaŭ nepercepteblaj al kiu ne parolas lingvon kun opozicio longa/mallonga. Kiam la lasta silabo estas la forta silabo, kompreneble, ĝi estas longe prononcata, sed la unua estas tre mallonga kiel en "está" /jŝ'ta/ (li/ŝi/ĝi estas).

La vokaloj estas aŭ fermaj aŭ malfermaj. En Portugalio kaj Afriko, nur la tonikaj longaj estas fermaj, sed ne en Brazilo, kie la fermo aŭ malfermo dependas de la daŭro de la vokalo en latina lingvo.

Estas tutnecese fari la sandion aŭ ligon de vortoj en la prononcado.

Diftongoj

En la Portugala estas multaj diftongoj, inkluzive la *nazaj* diftongoj : ão kaj õe, preskaŭ nepronunceblaj al fremdlingvanoj. Do vorto "quão" (kiom + adjektivo aŭ adverbo) estas pronuncata /kŭãŭn/(unusilaba). Estas fenomeno nomita "antecipo de nazeco" kiam vokalo ne naza venas antaŭ de naza konsonanto, ekz cama /'kâmə/, ne /'kama/, escepte en pli malnovaj prononcoj, ekz-e tiuj de nordportugalio, kiuj estas malpli nazecaj.

		Diftongo (IFA)	Ekzemplo	Traduko
Diminuendaj diftongoj *(vokalo + duonvokalo)*	malvastaj	[ej]	l**ei**, s**ei**	leĝo, (mi) scias
		[oj]	b**oi**, f**oi,** j**oi**o	bovo, estis, herbaĉo
		[uj]	c**ui**dado, alel**ui**a, **ui**rapuru	atento, haleluja, ujrapuruo (birdo el la familio Pipredoj)
		[ew]	**eu**, m**eu**, pigm**eu**, l**eu**	mi, mia, pigmeo, (li/ŝi/ĝi) legis
		[iw]	v**iu**, t**il**, fun**il**	(li/ŝi/ĝi) vidis, tildo, funelo
		[ow]	g**ol**fe, h**ou**ve	golfo (sporto), okazis
	vastaj	[aj]	p**ai,** m**ai**o	patro, majo
		[aw]	m**au**, anim**al**, **ál**bum	malbono, animalo
		[ɛj]	an**éi**s, fi**éi**s	ringoj, fideluloj
		[ɔj]	andr**oi**de, aster**oi**de, d**ói**	androjdo, asteroido, (ĝi) doloras
		[ɛw]	c**éu**, v**éu**, m**el**	ĉielo, vualo, mielo
		[ɔw]	s**ol**, r**ol**, arreb**ol**	suno, listo, ĉielruĝo
	nazaj	[ẽj], [ẽĵ]	m**ãe,** p**ãe**s, c**ãi**bra	patrino, panoj, kramfo
		[ẽj], [ẽĵ]	algu**ém**, t**em**, tr**em**, **em**, jov**em**, am**ém**, hom**en**s	iu, (li/ŝi/ĝi) havas, trajno, en, junulo, amen, viroj
		[õj], [õĵ]	p**õe**, coraç**õe**s	(li/ŝi/ĝi) metas, koroj
		[ũj], [ũĵ]	m**ui**to	tre
		[ẽw], [ẽw̃]	m**ão**, p**ão**, org**ão**, n**ão**, am**am**	mano, pano, organo, ne, ili amas
Kresĉendaj diftongoj *(duonvokalo + vokalo)*	malvastaj	[je]	**ie**manjá, histor**ie**ta	Jemaja, historieto
		[ji]	sér**ie,** calvíc**ie**	serio, kalveco
		[jo]	**io**do, ans**io**so, b**io**logia	jodo, anksia, biologio
		[ju]	cíl**io**, exíl**io,** v**iu**vez	cilio, ekzilo, vidv(in)eco
		[we]	d**oe**r, s**oe**rguer	dolori, leveti
		[wi]	ling**ui**ça, tranq**ui**lo, arg**ui**r, tên**ue**	kolbaso, trankvila, argumenti, subtila
		[wo]	d**uo**décimo, fl**uo**rescente, impet**uo**samente	dekdua, fluoreska, impete
		[wu]	ambíg**uo**, mút**uo,** exíg**uo**	ambigua, reciproka, malvastega
	vastaj	[ja], [jɐ]	**la**nomâmi, Brasíl**ia**, eutanás**ia,** réd**ea**	Janomamo (etnonomo), Braziljo, eŭtanazio, brido
		[jɛ]	d**ie**ta, qu**ie**to	dieto, kvieta
		[jɔ]	id**io**ta, p**io**r, v**io**la, **io**ga	idioto, malplej bona, vjolo, jogo
		[wa], [wɐ]	q**ua**se, ag**ua**rdar, mág**oa**	preskaŭ, atendi, ĉagreno
		[wɛ]	c**ue**ca, s**ue**co, seq**ue**stro	kalsono, svedo/sveda, malliberigo/kapto/sekvestro
		[wɔ]	q**uó**rum	kvorumo
	nazaj	[jã], [jẽ]	**ian**que (ĝi originale ne havas diftongon, sed estas banale prononcita tiel.)	jankio
		[jẽ]	**iem**enita, al**ien**ação, cl**ien**te	jemenano, alieneco, kliento
		[jõ]	abolic**ion**ismo, ac**ion**ista, **e on**de, **e on**tem, **e hom**em	aboliciismo, akciano, kaj kie, kaj hieraŭ, kaj viro
		[jũ]	méd**ium,** tr**iun**fal	mediumo, triumfa
		[wã], [wẽ]	q**ua**nto, q**ua**ndo, ming**ua**nte	kiom, kiam, malkreskanta luno
		[wẽ]	ag**ue**ntar, afl**ue**nte	elteni, afluanto
		[wĩ]	constit**ui**nte, ping**uim**	komponanto, pingveno
		[wõ]	**o on**ze, **o om**bro	la dekunuo, la ŝultro

P.S. 1: En la portugala lingvo, la kresĉendaj diftongoj okazas ĉefe en rapida parolado. En malrapida elparolo, ili fariĝas hiatoj.

P.S. 2: La referenca prononco de la ekzemploj estas la brazila, laŭ la akĉento de Rio-de-Ĵanejro. Tamen ili egalas ĉe la plejparto de la aliaj akĉentoj.

Forta silabo

Forta silabo povas esti la lasta kiel en "sabiá" /səbi'a/ (turdo), la antaŭlasta kiel en "sabia" /sə'biə/ (oni sciis) kaj la antaŭlasta kiel "sábia" /'sabiə aŭ 'sabjə/ (saĝulino) tio dependas de la senco kaj, ĉefe, de origino de la vorto.

La meto de forta silabo en vorto dependas nur de etimologio. Sekve, oni devas koni la prononcon en la latina lingvo por scii la fortan silabon en la portugalan.

Morfologio

Estas du bazaj tipoj da vortoj en la portugala : flekseblaj kaj neflekseblaj.

Flekseblaj estas artikoloj, numeraloj, pronomoj, nomoj kaj verboj. Neflekseblaj estas konjunkcioj, prepozicioj, adverboj, interjekcioj.

Artikoloj

Artikoloj : povas esti aŭ difinaj aŭ nedifinaj. La difina povas esti vira unu-nombra (**o**), vira multe-nombra (**os**), ina unu-nombra (**a**) kaj ina multe-nombra (**as**). La nedifina povas esti vira unu-nombra (**um**), vira multe-nombra (**uns**), ina unu-nombra (**uma**) kaj ina multe-nombra (**umas**).

Speco	Nombro	Vira	Ina	Ekzemploj
Difinaj	Singularo	**o**	**a**	o cachorro = la hundo a cachorra = la hundino
	Pluralo	**os**	**as**	os cachorros = la hundoj as cachorras = la hundinoj
Nedifinaj	Singularo	**um**	**uma**	um cachorro = hundo uns cachorros = hundoj
	Pluralo	**uns**	**umas**	uma cachorra = hundino umas cachorras = hundinoj

Numeraloj

Estas nur du tipoj de numeraloj en la portugala, la nombraj vortetoj kiuj indikas la kvanton kaj la vicordaj o-nombrovortoj kiuj indikas la rangon.

1	um	**30**	trinta	**1-a**	primeiro
2	dois	**40**	quarenta	**2-a**	segundo
3	três	**50**	cinquenta	**3-a**	terceiro
4	quatro	**60**	sessenta	**4-a**	quarto
5	cinco	**70**	setenta	**5-a**	quinto
6	seis	**80**	oitenta	**6-a**	sexto
7	sete	**90**	noventa	**7-a**	sétimo
8	oito	**100**	cem	**8-a**	oitavo
9	nove	**101**	cento e um	**9-a**	nono
10	dez	**102**	cento e dois	**10-a**	décimo
11	onze	**110**	cento e dez	**11-a**	décimo primeiro, undécimo
12	doze	**120**	cento e vinte	**12-a**	décimo segundo, duodécimo
13	treze	**200**	duzentos	**13-a**	décimo terceiro
14	catorze, quatorze	**300**	trezentos	**20-a**	vigésimo
15	quinze	**400**	quatrocentos	**21-a**	vigésimo primeiro
16	dezasseis, dezesseis*Brazilo*	**500**	quinhentos	**22-a**	vigésimo segundo
17	dezassete, dezessete*Brazilo*	**600**	seiscentos	**30-a**	trigésimo
18	dezoito	**700**	setecentos	**40-a**	quadragésimo
19	dezanove, dezenove*Brazilo*	**800**	oitocentos	**50-a**	quinquagésimo
20	vinte	**900**	novecentos	**60-a**	sexagésimo
21	vinte e um	**1000**	mil	**70-a**	septuagésimo
22	vinte e dois	**1001**	mil e um	**80-a**	octogésimo
23	vinte e três	**1100**	mil e cem	**90-a**	nonagésimo
24	vinte e quatro	**1101**	mil cento e um	**100-a**	centésimo
25	vinte e cinco	**1201**	mil duzentos e um	**200-a**	ducentésimo
26	vinte e seis	**1999**	mil novecentos e noventa e nove	**300-a**	trecentésimo
27	vinte e sete	**2016**	dois mil e dezesseis	**400-a**	quadringentésimo
28	vinte e oito	**1 000 000**	milhão	**500-a**	quingentésimo
29	vinte e nove	**1 000 000 000**	bilhão	**600-a**	seiscentésimo, sexcentésimo
		1 000 000 000 000	trilhão	**700-a**	septingentésimo
		1 000 000 000 000 000	quatrilhão	**800-a**	octingentésimo
		1 000 000 000 000 000 000	quintilhão	**900-a**	nongentésimo, noningentésimo
		1 000 000 000 000 000 000 000	sextilhão	**921-a**	nongentésimo vigésimo primeiro
		1 000 000 000 000 000 000 000 000	septilhão	**999-a**	nongentésimo nonagésimo nono
		1 000 000 000 000 000 000 000 000 000	octilhão	**1000-a**	milésimo
		1 000 000 000 000 000 000 000 000 000 000	nonilhão	**2000-a**	o dois milésimo, o segundo milésimo

Pronomoj

Pronomoj en la portugala estas la nuraj vortoj kiu havas kazojn (nominativon, akuzativon kaj dativon).

Personaj pronomoj : eu (mi), tu (ci, vi unu-nombra), ele (li), ela (ŝi), nós (ni), vós (vi multe-nombra), eles (*vira* ili, aŭ neŭtra multe-nombro), elas (*ina* ili).

Ne estas io kiel *ĝi*, oni, *sed krom la simpla ni estas specialaj pronomoj "a gente" kaj "nós" por traduki la esperanta ni. "A gente" laŭlitere signifas* la genton, iu ajn homaro kiu inkluzivas "min", *kaj "Nós" signifas rekte "ni". Por alparoli aliajn homojn, oni ne uzas normale "vós" (vi multe-nombra, reĝa vi), sed "vocês. La parola uzado de "vós" nuntempe iĝas arĥaisma kaj estas tre malofta, kaj apenaŭ uzeblas de maljunaj generacioj en kamparaj lokoj en Portugalio, aŭ en religiaj kuntekstoj; "tu" estas la familiara "vi" (unu-nombra) en Portugalio. En la plejmulto de regionoj de Brazilo, la familiara "vi" estas "você".*

Nombro	Persono	Kazoj					
		Nominativo		Akuzativo		Dativo	
		En la portugala	*En Esperanto*	*En la portugala*	*En Esperanto*	*En la portugala*	*En Esperanto*
Singularo	1-a	**eu** *Eu sou esperantista*	**mi** *Mi estas esperantisto*	**me** *Ele me viu*	**min** *Li min vidis*	**me,** **a mim** **p(a)ra mim***Brazilo* *Ele me deu a flor* *Ele deu a mim a flor* *Ele deu pra mim a flor**Brazilo*	**al mi** *Li donis al n*
	2-a	**tu, você***Brazilo* *Tu és esperantista* *Você é esperantista*	**vi** *Vi estas esperantisto*	**te** *Ele te viu*	**vin** *Li vin vidis*	**te** **a ti** **p(a)ra ti** **p(a)ra você***Brazilo* *Ele te deu a flor* *Ele deu a ti a flor* *Ele deu pra ti a flor* *Ele deu a flor pra você**Brazilo*	**al vi** *Li doni al vi*
	3-a	**ele, ela** *Ele/Ela é esperantista* *Ele é o esperantista* *Ela é a esperantista* *Ele é um cachorro.* *Ela é uma vaca.*	**li, ŝi, ĝi** *Li/Ŝi estas esperantisto* *Li estas la esperantisto* *Ŝi estas la esperantistino* *Ĝi estas hundo* *Ĝi estas bovino*	**o***vira* , **a***ina* **lo, la,** **na, no,** **ele***kontraŭgramatika en Brazilo*, **ela***kontraŭgramatika en Brazilo* *(ekz. 1) Ele viu o homem --> Ele o viu* (ekz. *2) Ele viu a mulher --> Ele a viu* (ekz. 3*) Ele tem o livro --> Ele o tem* (ekz. 4*) Ele tem a caneta --> Ele a tem* (ekz. 5*) Ele conseguiu vê-lo* (ekz. 6) *Ele conseguiu vê-la* (ekz. 7) *Eles viram-no* (ekz. 8) *Eles viram-na* *(ekz. 9) Ele viu ele* *(ekz. 10) Ele viu ela*	**lin, ŝin, ĝin** *(ekz. 1) Li vidis la viron --> Li lin vidis* *(ekz. 2) Li vidis la virinon --> Li ŝin vidis* *(ekz. 3) Li havas la libron --> li havas ĝin* *(ekz. 4) Li havas la plumon --> li havas ĝin* *(ekz. 5) Li sukcesis vidi lin* *(ekz. 6) Li sukcesis vidi ŝin* *(ekz. 7) Ili vidis lin* *(ekz. 8) Ili vidis ŝin* *(ekz. 9) Li vidis lin* *(ekz. 10) Li vidis ŝin*	**lhe,** **a ele, a ela,** **p(a)ra ele***Brazilo*, **p(a)ra ela***Brazilo* *Ele lhe deu a flor* *Ele deu a ele a flor* *Ele deu a ela a flor* *Ele deu pra ele a flor**Brazilo* *Ele deu pra ela a flor**Brazilo* *Ele deu a flor ao cachorro = Ele deu a flor pra ele*	**al li, ŝi, ĝi** Li donis al li Li donis al ŝ Li donis fl hundo
Pluralo	1-a	**nós** *Nós somos esperantistas*	**ni** *Ni estas epserantistoj*	**nos** *Ele nos viu*	**nin** *Li vidis nin*	**nos** Ele nos deu a flor	**al ni** *Li donis al n*
	2-a	**vós, vocês***Brazilo* *Vós sois esperantistas.*	**vi** *Vi estas esperantistoj*	**vos,** **vocês***kontraŭgramatika en Brazilo* *Ele vos viu*	**vin** *Li vin vidis*	**vos,** **a vocês***Brazilo* **p(a)ra vocês***Brazilo* *Ele vos deu a flor.*	**al vi** *Li donis la fl*

		Vocês são esperantistas.		*Ele viu vocês*		*Ele deu a flor a vocês* Ele deu a flor pra vocês	
	3-a	**eles, elas** *Eles são esperantistas* *Elas são esperantistas* *Eles são cachorros* *Elas são vacas*	**ili** *Ili estas esperantistoj* *Ili estas esperantistinoj* *Ili estas hundoj* *Ili estas bovinoj*	**os**, **as** **los**, **las** **nos**, **nas** **eles***kontraŭgramatika en Brazilo*, **elas***kontraŭgramatika en Brazilo* *Ele viu os homens --> Ele os viu* *Ele viu as mulheres --> Ele as viu* *Ele viu os livros --> Ele os viu* *Ele viu as canetas --> Ele as viu* *Ele conseguiu vê-las* *Ele conseguiu vê-los* *Eles viram-nos* *Eles viram-nas* Ele viu eles Ele viu elas	**ilin** *Li vidis la virojn --> Li ilin vidis* *Li vidis la virinojn --> Li ilin vidis* *Li vidis la librojn --> Li ilin vidis* *Li vidis la plumojn --> Li ilin vidis* *Ili vidis ilin* *Ili vidis ilin*	**lhes**, **a eles, a elas,** **p(a)ra eles***Brazilo* **p(a)ra elas***Brazilo* *Ele lhes deu flores* Ele deu flores para eles Ele deu flores para elas Ele deu flores pra eles Ele deu flores pra elas	**al ili** *Li donis al il*

Kiam la verbo kiu antaŭas la objektan pronomon finiĝas per **-z**, **-s** aŭ **-r**, la pronomoj '***o, os, a, as'*** fariĝas '***lo, la, los, las.'***

Ekz.: ver + o = vê-l**o**

Kiam la verbo kiu antaŭas la objektan pronomon finiĝas per naza sono, la pronomoj '**a, o, as, os**' fariĝas '**no, na, nos, nas**'.

Ekz.: viram + o = viram-**no**

Substantivoj kaj adjektivoj

Estas du tipoj de "nomoj" en portugala lingvo : substantivoj kaj adjektivoj, kvankam ili estas semantike kaj sintakse malsamaj, morfologie ili havas la saman formon = radiko + tema vokalo (o, a, e, aŭ nulo). Por fari multe-nombron oni plejofte metas -s post la tema vokalo; se la tema vokalo estas nula, oni metas -es, escepte se la lasta **fonemo** (ne litero!) de la radiko jam estas /s/ (en ĉi tiu kazo la regulo ne estas klara): casa/casas (domo/domoj), menino/meninos (knabo/knaboj), lebre/lebres (leporo/leporoj), lápis/lápis (krajono/krajonoj), sed ás/ases (aso/asoj). La nomoj ne havas kazojn.

La adjektivo sekvas la substantivon laŭ nombro kaj genro.

Nombro	Genro	En la portugala	Traduko
Singularo	vira	homem bonito	bela viro
	ina	mulher bonita	bela virino
Pluralo	vira	homens bonitos	belaj viroj
	ina	mulheres bonitas	belaj virinoj

Verboj en la portugala, kiel en ĉiuj latinidaj lingvoj estas tre kompleksaj. Estas tri tempoj (estonta, estinta, estanta), tri modoj (subjunktivo, indikativo kaj imperativo), tri aspektoj (perfekta, pluolperfekta kaj daŭra) kaj ses personoj. Verboj povas havi simplajn tempojn aŭ komponitajn tempojn.

Estas du tipoj de adverboj (kiel en Esperanto): primitivaj kaj derivitaj. Primitivaj adverboj (e-vortecaj vortetoj) ne havas especialan karakteron: hoje (hodiaŭ), agora (nun), depois (poste), longe (malproksime). Derivitaj adverboj (e-vortoj) kutime finas per -mente: alegremente (ĝoje), claramente (klare), definitivamente (definitive).

Konjunkcioj, prepozicioj kaj interjekcioj kiel en la Esperanto, ne havas "logikan", unusencan uzon. Portugaloj tro uzas prepozicion *a* (al, je) por preskaŭ ĉiuj sintaksaj rilatoj, la prepozicio *de* (de, ekde, el) havas tre ampleksan utilon, ktp.

Sintakso

La kutima vortordo estas Subjekto-Verbo-Objekto, unue la rekta objekto kaj due la malrekta. Sed estas granda libero, inkluzive oni povas fari Objekto-Verbo-Subjekto, kiel la senco permesas aŭ metante antaŭ la rekta objekto la prepozicion 'a' (je):

Bruto matou César (Bruto mortigis Cezaron),
Bruto a César matou (Bruto je Cezaro mortigis),
a César Bruto matou (je Cezaro Bruto mortigis), a César matou Bruto (je Cezaro mortigis Bruto).

En la brazila variaĵo la metado de adverbo estas tutlibera, inkluzive "não" (ne). Tiu rilate, la portugalia varianto estas pli ortodoksa kaj nefleksema:

Não faça isso (PT/BR = (Vi) ne faru tion) / Faz isso não (BR = (Vi) faru tion ne).
Hoje eu não vou lá (PT/BR = Hodiaŭ mi ne iras/iros tien)
Hoje não vou eu lá(PT/ BR = hodiaŭ mi ne estas tiu, kiu iras/iros — dum inversio, tio estas, antaŭ dependa frazo, aŭ kun forta enfazo)(ne iros mi)
aŭ Eu vou lá hoje não (BR = mi iras/iros tien hodiaŭ ne)
samsignifas, nur havas stilan sanĝon. Hodiaŭ, brazilaj junuloj emas meti "não" (ne) post la verbo. La semida adverbo "lá" uzata nur kun verbo "saber" (scii) devige venas post verbo: "sei lá", *mi ne scias* (laŭlitere *mi scias ne*).

Parolantoj

Jen la landoj aŭ regionoj, kie la portugala estas oficiala lingvo :

- Portugalio (10.000.000) – lando en Okcidenta Eŭropo
- Acoroj (238.000) – Portugalaj insuloj en la Norda Atlantiko
- Madejro (438.000) – Portugalaj insuloj en la Atlantiko apud Afriko
- Brazilo (182.000.000) – vasta lando en Ameriko
- Insularo Kabo-Verdo (405.000) Atlantikaj insuloj apud Okcidenta Afriko
- Gvineo-Bisaŭo (1.250.000) – lando en Okcidenta Afriko
- Santomeo kaj Principeo (155.000) – insuloj en la Golfo de Gvineo, Atlantiko
- Angolo (11.177.000) – granda lando en Suda Afriko
- Mozambiko (19.125.000) – granda lando en Suda Afriko apud la Hinda Oceano.
- Orienta Timoro (555.000) – lando sur la orienta parto de Timoro en la Malaja Insularo.

mapo pri la lingvoj parolataj sur la Ibera duoninsulo: la portugala bildigita malhelverde

Aliaj landoj, kie kelkaj homoj ankoraŭ parolas la portugalan: Barato (Dio, Damao, Goa, Mumbajo, Mangalore, Mahé, Cananore, Koĉin, portugalaj kolonioj ĝis 1961); Makao en Ĉinio.

Variaĵoj

Eŭropa portugala (en portugala: *português europeu*, prononce [puɾtu'ɣez ewɾu'pew]), konata ankaŭ kiel Luzitana portugala (*português lusitano*), Iberia portugala (*português ibérico*) kaj Portugala de Portugalio (*português de Portugal*) aŭ eĉ "norma portugala", "normiga portugala" aŭ "malnovmonda portugala" referencas al la portugala lingvo parolata en Portugalio. La norma portugala prononcmaniero, la prestiĝa normo bazita sur la Eŭropa portugala, estas la referenco por Portugalio, la portugal-parolantaj landoj de Afriko, Orienta Timoro kaj Makao. La vorto "Eŭropa" estis elektita por eviti la ripeton "Portugala portugala" ("português português") kontrasta al la Brazila portugala.

La landoj en la mondo kie la portugala estas oficiala lingvo

La Brazila portugala (en portugala *brasileiro*, aŭ *português do Brasil*) estas serio de dialektoj de la portugala lingvo uzita ĉefe en Brazilo. Ĝi estas parolata de proksimume la 200 milionoj da loĝantoj el Brazilo kaj de kelkaj milionoj da brazilaj elmigrintoj, ĉefe en Usono, Paragvajo, Japanio, Portugalio, kaj Argentino. La Brazila portugala havis sian propran disvolviĝon.

Nova ortografio

Ekde januaro de 2008, la landaro de la Komunumo de landoj de la portugala lingvo, nome: Angolo, Brazilo, Kabo-Verdo, Gvine-Bissaŭo, Mozambiko, Portugalio, Santomeo kaj Principeo, kaj Orienta Timoro — uzan la unuiĝintan ortografion.

- La paroksitonoj kun duobla "o"-termino ne plu portos cirkumflekson. Anstataŭ "abençôo", "enjôo" aŭ vôo, ĉiuj skribiĝos kiel "abençoo" kaj "voo".[1]
- Estis ŝanĝitaj la reguloj pri la uzado de dividostreko en la mezo de la vortoj. La dividostreko malaperos en la mezo de la vortoj, krom tiuj en kiuj la prefikso havas la finaĵo 'r', kaze de "hiper", "inter-" kaj "super". Pro tio oni skribos "extraescolar", aeroespacial" kaj "autostrada".[2]
- Oni ne plu uzos la cirkumflekson ĉe la triaj personoj de la pluralo de la prezenco de la indikativo, nek ĉe la substantivo de la verboj "crer", "dar", "ler", "ver" kaj ĝiaj derivaĵoj. Estos korektaj la formoj "creem", "deem", "leem" kaj "veem".[1]
- Oni kreis kelkajn kazojn de duopa formo por fari distingon, kiel, ekzemple, la uzado de dekstrakorna akcento ĉe la unua persono de la pluralo de la perfekta preterito de verboj de la unua konjugacio, kiel ekzemple, "louvámos" en kontrasto kun "louvamos", kaj "amámos" en kontrasto kun "amamos". Tiaj formoj, tamen, ne estas tre konsekvaj ĉar oni ne povas uzi ĝin por la dua aŭ tria knojugacio. Ekzemple, comemos (estinto aŭ estanto, neniam "comêmos" por estinteco), partimos (estinteco aŭ estanteco, neniam "partímos" por la estinteco)
- La tremao (brazila) entute malaperas. Estos korekte en Brazilo skribi "linguiça", "sequência", "frequência" kaj "quinquênio", anstataŭ lingüiça, seqüência, fregüência kaj qüinqüenio.[3]
- La alfabeto havos 26 literojn anstataŭ nur 23, inkludante la literojn "k", "w" kaj "y".[4]
- Ne plu uziĝos la akcento por distingi inter "pára" (verbo) kaj "para" (prepozicio).
- En Brazilo la dekstrakorna akcento foriĝos de la malfermitaj diftongoj "ei" kaj "oi" de la paroksitonaj vortoj kiel "assembléia", "idéia", "heróica" e "jibóia". Korektaj formoj estos assembleia, ideia, heroica e jiboia;[5]
- En Portugalio malaperos ĉe la skribita lingvo la "c" kaj "p" en vortoj, kie ili ne prononciĝas, kiel en "acção", "acto", "adopção" e "baptismo". Ĝustaj estos: ação, ato, adoção e batismo.
- Portugalio konservos la dekstrakornan akcenton super la "e" kaj la "o" antaŭ "m" aŭ "n", dum Brazilo daŭre uzos circumflekson ĉe ĉi tiuj vortoj, tiele: académico/acadêmico, génio/gênio, fenómeno/fenômeno, bónus/bônus.[1] Portugalio konservos duobligitajn konsonantojn "nn" kaj "mm"

kiam ili estas legitaj malkunigite, ekz-e comummente (legita en Portugalio kiel comum-mente), kaj connosco (legita com-nosco). Braxilo tamen ne uzos ilin, ĉar tradicie ili ne ekzistas en Brazilo kaj estas legitaj kiel "comumente" kaj "conosco". Aliaj malsamoj estas ekzemple "amnistia" en Portugalujo kaj "anistia" en Brazilo, kvankam ambaŭ skribas "amnésia", "amniótico" ktp.

Vidu ankaŭ

- Portugallingva vortprovizo
- Portugalusonanoj

Referencoj

1. ↑ [1,0] [1,1] [1,2] Acento circunflexo – O que muda (http://www.brasilescola.com/acordo-ortografico/acento-circunflexo-o-que-muda.htm) portugale
2. ↑ Hífen – Acordo Ortográfico (http://www.brasilescola.com/acordo-ortografico/hifen.htm) portugale
3. ↑ Trema – é hora de partir! (http://www.brasilescola.com/acordo-ortografico/trema-e-hora-de-partir.htm) portugale
4. ↑ O Alfabeto Brasileiro e as 26 Letras! (http://www.brasilescola.com/acordo-ortografico/o-alfabeto-brasileiro-as-26-letras.htm) portugale
5. ↑ Acento Agudo (http://www.brasilescola.com/acordo-ortografico/acento-agudo.htm) portugale

Eksteraj ligiloj

- Kurso de Portugala Lingvo (http://www.brazilo.com/portugala/) (principe la brazila variaĵo) por Esperantistoj
- Vortaroj en la katalogo DMoz (http://dmoz.org/World/Esperanto/Informo/Vortaroj/Portugala/)

Literaturo

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1993/08, paĝo 21: *La portugala* verkita de Bradley Kendal.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Portugala_lingvo&oldid=6948174"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:19, 27 apr. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.